

POEMOJ

DE

FRANÇOIS VILLON



A


EDWARD OCKEY

BIBLIOTEKO
DE LA HOMA LINGVO
EDVARD OKI

6962

16x2019hel006962JC

POEMOJ



ARTUR DOMÈNECH

Barcelona, 1877-1936

P O E M O J

DE

ARTUR DOMÈNECH



BARCELONA

1937

JE LA MEMORO DE MIA BOPATRO
ARTUR DOMÈNECH

La voĉo de nia poeto silentis,
forestas nun liaj akcento kaj varm';
ĉe lia forpaso ni tamen eksentis
ke restos de liaj poemoj la ĉarm'.

Ĉe niaj Flurludoj ne plu li deklamos
per voĉo vibranta, kun vigla solen';
sed lian spiriton, memoron ni amos;
reelĥos voĉ' lia sur nia ĉagren'.

Flugadis la rimoj sonoraj kaj puraj,
gajigis l' arbaron dum nokt' najtingal';
nun noktoj fariĝas mallumaj, teruraj...
ĉe l' tombo li kuŝas en sia mortpal'.

Sed daŭros la verkoj de lia inspiro
facila, ludema, flirtanta sen ĉes',
kaj restos la sonoj de lia orliro
por niaj oreloj konstanta kares'.

JAUME GRAU CASAS

AMO

Amo! beninda nomo, kiu sonas
por mi kvazaŭ belega melodio,
dolĉega, sankta vorto, kiu donas
la dolĉecon al kor' de l' ambrozio;
dian, oritan liron mi bezonas
por esprimi per dolĉa poezio,
kiel vi sola estas por la homo
la plej bela, ŝatinda, ĉarma nomo.

Sen vi la vivo estus nur malĝojo,
bedaŭro, malfeliĉo kaj ĉagreno;
sen vi estus por hom' la viva vojo
plenda, larma ekzil', sencela peno;
sed se vin ĝuas hom' por unu fojo,
ŝanĝiĝas tiu mondo je Edeno,
kie, anstataŭ larmoj kaj doloroj,
nur loĝas poeziaj, ĉarmaj floroj.

Pro vi varton, nutradon, kisojn, lulojn
malŝparas la patrino por infano,
kaj ruĝigas la plor' ŝiajn okulojn,
aŭ kaŝiĝas en ŝia brust' vulkano
da korpremaj ekĝemoj, kiam brulojn
febrajn ardigas en filet' malsano.
La dolĉa de patrin' am' emocias
ĉar pli ol ŝi neniu ami scias.

Pro vi, kiam eksonas la signalo
ke la patrujo estas en danĝero,
la junularo kuras al batalo
por prezenti al malamika fero
siajn brustojn, por morti se fatalo
ĝiajn korpojn restigos sur la tero;
ĉar morto por patruj' ne kaŭzas ploron,
ne, la patruja am' nur donas gloron.

Pro vi, la Bonfarad' la mondon regas
kaj en la hospitaloj kaj aziloj
jen maljunulon en malsan' ĝi flegas,
jen orfon vartas ĝiaj la gefiloj;
gefiloj sanktaj, kies nomojn legas
sur oraj paĝoj la homar' je miloj.
Al vi sendas poet' vorton salutan,
am', kiu amas la homaron tutan!

Pro vi, kaŝite en l' arbar' ĉeestas
feinoj ofte de l' fianĉ' l' amjesojn,

dum en branĉaro jen silente restas
birdaro aŭskultante la promesojn
de l' gefianĉoj, jen ĝi ĥore festas
per siaj triloj amajn la karesojn,
kiam eksonas en l' arbara paco
ĉu honta kiso, ĉu krakanta ŝmaco.

Pro vi, nur pro vi, ĉiam en Naturo
resonas de la viv' la ĉarma kanto :
am'! bruas de l' venteto la murmuro
lulante papilion sur galanto,
am'! zumas burd' trinkante kun plezuro
la roson de l' florar' el diamanto,
am'! trilas najtingal' sur branĉ' sonore,
am'! eĥe la birdar' retilas ĥore.

Amo ĉie kaj ĉiam; eĉ la ondo
de l' mar' bruante am'! lekas la rokon;
eĉ la fulmanta el nubegoj rondo
ĉirkaŭanta la monton tondras vokon
al am'! resonigante de la mondo
eĉ la plej malproksiman, lastan lokon;
ĉie, ĉie l' am' estas: en aero,
en mar', en mont', en val', en tuta tero.

Amo! beninda nomo, vorto bela,
por la lip' dolĉa kiel nektar' dia,
rava por l' aŭdo kiel son' ĉiela,
de ĉarmoj font', inspiro poezia,

gajo de l' koroj, de la viv' cel' hela!
Jen estas l' chô de la kanto mia :
Amo! vi sola estas por la homo
la plej bela, ŝatinda, ĉarma nomo.

AL NEAMANTA AMATINO

Aŭskultu, belulin' ĉarma,
miajn malgajajn sopirojn,
ne rikanu la dezirojn
de tiu ĉi koro varma ;
kial vi la vivon larma
igas mian senkompate,
rigardante min malŝate
per mieno malafabla,
se nur mi estas kapabla
amegi vin delikate ?

Mi vin amas, knabin' bela,
per la tuta mia koro,
kiel abeleton floro,

kiel floron ros' ĉiela,
kiel la pura lun' hela
laga reflektantan ĝin,
kiel pasero sur pin'
sin lulanta neston sian,
kiel papili' gracian
florejon, tiel mi vin.

Mi vin amas kaj pro tio
mi frenezas, mi konfuzas,
mi malsanas, mi ĵaluzas
kaj min mortigas envio.
Ho kia ĵaluzpasio,
kiam venteto petola
dum maten' povas ĝi sola
kisi vin, sen permespeto!
Se mi nur estus venteto!...
Se vi nur estus bonvola!...

Sed, ho ve, viaj okuloj
ne por mi karesaj estas
kaj via rigardo restas
akra por miaj postuloj.
Kial pro l' ardantaj bruloj,
kiuj tiel min konsumas,
viaj okuloj ne lumas,
kaj ne per rigard' karesa,
ne per ridet' ampromesa
vi l' ĝojon mian plenumas?

Amu min! diru la vorton,
kies potenco magia
povus de la koro mia
en vivon ŝanĝi la morton.
Ne pli dezirindan sorton
revas mia ambici',
ol bruligi de pasi'
en via koro la flamon,
por ke sentante vi amon
estu l' am' via por mi.

SOPIROJ

Dum multaj per sopiro
kvieton trovas,
al mi sopiroj pluan
ĉagrenon donas ;
mi ne komprenas :
vivigo por l' aliaj
mort' por mi estas.

Feliĉa l' alven' via,
ho hirundetoj!
printempon ĝi anoncas...
al vi bonvenon!
Tamen por ĉiam
de longe la printempon
mi perdis, mian.

La kant' de suferanto
estas sopiro
vaganta tra l' aero,
tra la senfino...
multaj kuniĝas,
kaj tiam la ventegoj
blekas timigaj.

Mi kredis min, trafinta
fine la celon
mortigi mian amon,
ho, naiveco!
Kiel fenikso,
ĝi renaskiĝas forta
el siaj cindroj.

Ke mi devas ja fini
mian ĉagrenon,
neniu ĉar eterne
daŭras sufero?
Unu ekzistas:
en mondo sen patrino
resti por ĉiam!

Patro diris, feliĉon
mian zorganta:
«vi lernu, vi kleriĝu,
fariĝu saĝa...»
patrino mia,

kisante min, nur diris :
«fil', estu virta ! »

La floroj ornamantaj
vian fenestron
Ĉiumatene montras
fluidajn perlojn ;
de l' koro mia
la larmoj estas ili...
plor' rosiĝinta.

De velboat' mi vidis
dum longaj horoj
l' iradon malrapidan
en horizonton...
de l' perfid' via
samiras la memoro,
sammalrapidas !

Mi vidis grandan fajron
brile brulantan
kaj cindron nur produktis
la brilo fajra...
tiel de l' vivo
plej brila, post la morto
restas nur cindroj.

EL KREPUSKO

(Vesperkanto de maristo)

Vi venu, karulin', mia boato
kun ornamar' de fest' atendas nin...
ĝi ŝajnas, la boat', sur la marplato,
belornamita trono de diin'.

Sur tia tron' sidiĝu, kaj ekvidos
Venus' konkurantinon sur ondar';
ĉar fiŝoj, ondoj, mevoj tuj rapidos
aklami vin reĝino de la mar'.

Kaj vi estos reĝin', mi vasal' via,
la fiŝoj korteganoj, la siren'
paĝi', kaj de ĉiel' la blumagia
arkaĵo, stelbrilanta baldaken'.

De l' sunsubiro kiam la ruĝhelo
brullumos trans la mont' kiel ruben',
ni sur mar' ruĝa, sub ruĝa ĉielo,
tra via regn' kuniros en promen'.

De l' ondoj malkvictaj respektplene
lulantaj nin tra la murmur-akord',
alportos marventet' al ni serene
la malproksimajn bruojn de l' marbord'.

Kaj dume la boat', de l' vent' ŝovita,
nin enkondukos mezen de l' lazur',
kaj tie, for de l' mondo hipokrita,
mi vin kaj vi min amos, ho plezur'!

En la kvietosilento de la maro,
de la ĉiel-lazur' sub la majest',
de kisoj, de karesoj la nektaro
dolĉigos nian amon sen atest'.

Kaj tiam en ĉiel' la steloj brilaj
pli hele palpebrumos kun envi',
kaj eĥos de l' sirenoj fals-ĝentilaj
la kantoj plenaj de ĵaluzpasi'...

Vi venu karulin', mia boato
kun ornamar' de fest' atendas nin...
ĝi ŝajnas, la boat', sur la marplato,
belornamita trono de diin'.

AL ROZO

Via nom' estas Rozo; kiel prave
tian nomon vi rajtas, knabin' bela!
Kiel rozo — de l' floroj, vi samrave,
 pro via ĉarmo hela,
de l' belulinoj estas reĝin' glora;
kiel rozflor' — belega, bonodora...

* * *

Se mi estus de roso perla guto,
 je nokto de somero,
kvazaŭ deca al vi ĉieltributo,
jen mi, sur vin falinte el aero,
min kaŝus inter viaj odorplenaj
 folioj ruĝkoloraj,

dum la horoj de l' nokt' kvietserenaj,
dum la horoj, pro vi, parfumodoraj.

Kun kia ĝu' mi tiam
dolĉe ripozus en kvietsilento,
dum min dorlotluladus vi ĝis kiam
surprizus nin la sun' de oriento
kaj ĵaluze, ebrian je parfumo
min vaporigus ĝia fajra lumo!

* * *

Se mi estus argenta papilio
kun la flugiloj blankaj kaj graciaj,
mi ŝtelus plian blankon al lilio
por la flugiloj miaj,
kaj mi ĉirkaŭflirtadus vin kokete,
nur vin; pro tio la ceteraj floroj
ĵaluzmurmurus kun ventet' sekrete
ĉar ne min ravas per siaj koloroj,
ĉar nur vi estas inda
je l' admir' mia, nur vi min altiras,
ĉar nur vin amas mi per amo blinda,
ĉar nur pro vi, flor' ĉarma, mi sopiras.

Kaj kiam mi jam laca
pro la longa flirtad' serĉus kuŝlokon,
ruĝa kuŝejo estus vi plej paca:
brulantaĵ' surtenanta neĝan flokon!
de blanko kaj purpuro l' idilio:
sur brusto de reĝin' blanka paĝio!

* * *

Se mi najtingal' estus delikata
kun sonora trilado melodia,
 nestejo adekvata
estus via rozuj' por la nest' mia.

De tie miaj triloj
jen gaje, kvazaŭ himno glora, sonus
kiam matene fajrsimilaj briloj
de l' naskiĝanta sun' hele vin kronus,
jen ĝeme, kvazaŭ plorsingultoj, plendus
kiam la nokto, sterniĝante ĉie,
funebbron kaj mallumon sur vin sendus
kaj nigro kovrus vin melankolie.

Per mia tril', la valo
kaj la mont' kaj l' arbar' kaj la rivero
sciĝus pri l' amsent' de najtingalo
kaj pleniĝus de milda ammistero;
ĉar ĉu gaja l' kant' ĉu melankolia
eĥus ĉiam laŭ ritm' de am' pasia.

* * *

Sed, ho ve, ne rosguto,
nek papili' nek najtingal' mi estas.
Por vi, reĝin', kiel vasaltributo
 nur liro mia restas:
per ĝi laŭtiĝu mia amsekreto;
 mi estas nur poeto.

KONKURENCO

—Pasintan nokton, knabino mia,
en songĥ' feliĉon atingis mi.

—Ho karuleto, dum nokto tia,
ol vi feliĉa mi estis pli.

—Ne kredu tion! la songĥ' ja estis
ke mi lipkisis vin kun fervor'...

—Mi songĥis same! kaj poste? —restis
ambaŭ brakpreme ni kor' ĉe kor'...

—Same! kaj poste? — Poste... jam mia
feliĉ' ne daŭris, knabin', ho ve,
ĉar mi vekigis el songo tia...

—Ĉu vi vekigis? Mi... tute ne!

LA NASKIĜO DE AMO

Kiam, ĵus l' unuan fojon, ekruĝiĝis oriento
per magiaj fajraj ruĝoj de l' giganta suna flam',
jen brilegis la rideto de l' Kreint' en firmamento,
kaj tuj, kiel nub' maldensa disigita de la vento,
tra la mondo disvastiĝis ĵuse naskiĝinta Am'.

Tiam, pro influ' magia, ekskuata de fervoroj,
ĝoje tremis kaj sin sentis ekvivadi la natur';
kaj pleniĝis la sfer' tuta de belaĵoj, de koloroj,
de lumheloj, de bruetoj, de parfumoj, de sonoroj,
de belec', de poezio kaj de revoj pri plezur'.

Pli ol iam palpebrumis en ĉielo la stelaro
kiel miloj da okuloj surprizitaj de la mir';
baldakenon similante de grandega dialtaro
la ĉiela blua sfero reflektiĝis en la maro
kiel pluv' de diamantoj sur pavimon el safir'.

L'ombroj noktaj, malrapide forpuŝataj de la honto
pro malvenko dum batalo longedaŭra kontraŭ lun',
kun fiero sin solene kaŝis preter horizonto,
dum per helradi' ricevis sur la supro de la monto
blanka neĝ' l' unuan kison de la fajrlumanta sun'.

Kaj la neĝo transformiĝis, pro mil lumaj variantoj,
en mirindan katarakton, je la sorĉ' de tiu kis';
el la mont' malsuprenfalis superŝut' da diamantoj,
pluvoj da rubenoj, perloj, milfacetaj brilantoj,
kaj kaskadoj perlamotaj kun nuancoj de turkis'.

Ekvekiĝis malproksimo: kaj la tulo de nebuloj
de l' venteto disŝirita, kvazaŭ delikata gaz',
transformiĝis en nubetojn orumitajn de sunbruloj
kiuj ŝajnis, super kampoj el smerald', arĝentmakuloj
sur kolosa plafonego el safiro kaj topaz'.

Murmuranta rivereto, de l' florej' kristalserpento.
ckkantetis, trobador' ebriiĝinta je nektar';
florojn kisis; serpentbrilis kvazaŭ strio el arĝento;
plikreskinte ĝi kuniĝis kun la fluo de torento
kaj, iĝinte riverego, forkuradis ĝis la mar'.

Heligante la sablaron per blankhelo brilanta,
ambroperla ŝaŭmo brilis sur marondoj, kiel kron';
kaj la ondoj ekludetis sur sablaro diamanta
dum, de l' malkvieta maro litanie resonanta,
kun eterna ritmo eĥis, ĉe l' rokejo, la kanzon'.

La kreskaĵoj sin ornamis kun la perloj de l' ros' brila;
font' murmuris ĉe la ombro de kvieta arbaret';
aromiĝis la aero tuta per arom' subtila;
la burgonoj, sur tapiŝo verda kaj velursimila,
floris, kun krakad' de kisoj, de l' florej' en la kviet'.

Arogante malfaldiĝis la folioj de la floroj,
kvazaŭ roboj kun plej ĉarma bril' de silko kaj velur';
la tapiŝon verdan brodis mil diversaj florkoloroj;
la kamparo tuta, plena de la floraj bonodoroj,
iĝis templo kaj sanktej' de poezio kaj plezur'.

Ekresonis la trilado de la birdoj en aero,
kvazaŭ en la templo sonus solenludo de orgen':
kaj la triloj de l' birdaro suprenflugis al etero,
kvazaŭ svarma babilado de anĝeloj sur la tero,
kvazaŭ ĥoro de serafoj kaj keruboj en eden'.

Ĉio, sur ĝojanta tero, ekridetis de plezuro
kaj fandiĝis unusente en komuna ĝojaklam';
la parfumoj de la floroj, de l' venteto la murmuro,
la trilado de la birdoj kaj la bluo de l' lazuro,
ĉio, ĉio, gaje festis, pro la eknaskiĝ' de Am'.

Kaj de la moment' unua, de l' natur' en la komenco,
triumfante sur la tero estis Am' unika reĝ',
ĝi animo de la mondo, ĝi de l' vivo la esenco,
ĝi ĉiela senditaĵo kies forto kaj potenco
tuj montriĝis per regado de mistera amoleĝ'.

Petolema tuj ekamis la ventet' la ĉarmajn florojn,
inter ili ludetante kun murmuroj de pasi',
disportante tra l'aero ebriligajn bonodorojn,
kantetante tre mallaŭte dolĉajn, mildajn fajfsonorojn,
kiuj sonis en florejo kiel ama melodi'.

Tuj ekamis ankaŭ unuj la aliajn la floretoj
de l' herbej'; sekretportisto estis blanka papili';
por fidela trairad' de flor' al flor' kun amaj petoj,
al flugila kuriero, je l' ricev' de l' amsekretoj,
ĉiu floro pagis guton da dolĉega ambrozi'.

Tuj ekamis la birdeto flirtadante kun gracio
l' amepantan parulinon, inter branĉoj, apud nest':
iĝis tiam la branĉaro, sub la ombroverd', podio
kie trile sonoradis, kun mistera harmonio,
ĉu pasia madrigalo, ĉu triumfa kant' de fest'.

Kaj ekamis en kaŝejoj de arbar' la sovaĝbestoj;
kaj la fiŝoj rapidmovaj en la fundo de la mar';
kaj la fortaj rabobirdoj en la altaj siaj nestoj
kiuj, kvazaŭ nevenkeblaj fortikaĵoj, sur la krestoj
kuŝas el ŝtonegaj blokoj, de la suproj de l' montar'.

Eĉ la ĝermoj interamis sin, sub ter', kun antaŭsento
de l' florado de printempo, de l' fruktado de aŭtun':
krevis imitante kisojn, de l' mallum' en la silento,
kaj de l'idoj oferdonis la branĉaron al la vento,
la radikojn al la tero, kaj la fruktojn al la sun'.

Ĉiuj teraj kaj ĉielaj elementoj de l' naturo
allogataj de amsento kun fervor' dediĉis sin
al kreado, sur la tero, de vivanta amfiguro
harmonie laborante, klopodante en konkuro
por plej bela, kaj perfekta, kaj miriga krei ĝin.

Tero, maro, kaj ĉielo, penon kaj materialon
por modeli l'amfiguron ekliveris en komun' :
ter' provizis por la korpo alabastron kaj opalon ;
mar' por dentoj blankajn perlojn kaj por lipoj rugĝkoralon ;
por hararo oran silkon la radioj de la sun'.

La helbluo de l' lazuro kun la mildo de gazelo
por okuloj kunfandiĝis, per magia sorĉkombin' ;
vangoj iĝis el du rozoj ; pruntis voĉon la kardelo ;
kaj al palma beltalio aliĝinte perla helo,
kiel ŝpruc' de kisesenco, eknaskiĝis la virin'.

Kaj de tiam, de l' komenco de la mondo, virin' restas
la sanktejo kie ardas la eterna ama flam' :
celo gaja de la vivo, ŝi per sia ĉarmo estas ;
kaj, vivanta amfiguro, tra l' jarcentoj ŝi atestas
ke sur ter' la vivo floras ĉar en ĝi reĝadas Am'.

VIAJ OKULOJ

Se estas la rigardo, de l'animo
vera reflektio,
okuloj viaj estas la esprimo
de plenperfekto.
Ho, kiel estas pura l' anim' via,
ho kiel bela,
laŭ via rigard' milda, senpasia,
naiva, karesema kaj anĝela!

L'okuloj viaj de ĉielkoloro,
de helo brila,
sub la gracia brovarkaj' el oro,
velursimila,
du bluj elŝiraĵoj ŝajne estas
de la lazuro;
du pecoj de ĉielo kiuj restas,
por ŝirm', en juveluj' el orveluro.

Kiele je l' tagiĝ' rosgut' perlumas
pro l' sunrebrilo,
pro senpekeco tiel milde lumas
via pupilo ;
kiele ne l' sablaron en kvieto
marondoj frizas,
tiele de la vivo l' malkvieto,
pasante kontraŭ ĝi ne l' frunton ĉizas.

Kaj, kiel en lazur' modesta stelo
kaŝe fajrumas,
sed trans la blua fundo de l' ĉielo
tamen ĝi lumas,
jen tiel, trans la blua fund' de via
rigardo bela,
kaŝeme, sed serena, plenradia,
fajrumas modestec' kun brilo stela.

En via pupil' regas tiu ĉarma
kaj miroplena
de ensorĉita virgulin', senvarma
rigard' serena.
Ho, kiom da ĉastec', kiom da mildo
sur min direktas
l'okuloj viaj kiam mia bildo
en ili, mirekstaze, sin reflektas !

Jen tiam mia lir', de siaj kordoj
la tutan gamon

aŭdigas, kaj per versoj kaj akordoj
ĝi kantas amon;
kaj alten, alten, sian kanton levas
la liro mia,
dum, forportata de l' feliĉ', mi revas
en la reviga lum' de l' rigard' via.

Sed kiam vi ne min rigardas, muta
la liro restas,
kaj por unu rigard', deziro tuta
de l'anim' estas
eĉ de poet' la nomon oferdoni
en mortsoĝiro,
kaj en la fund' de ĝia bluo droni
kun miaj versoj kaj kun mia liro.

ŜATATA DEMONO

«Kiam mi virinon trovas
nomi ŝin demon' mi povas ;
ŝi, kun masko de anĝelo,
en inferon min enŝovas...
tra la pordo de l' ĉielo.»

Ĉiam batas mia koro,
kaj mi sentas min en gloro,
kaj la sang' en mi sin movas,
kaj ekkaptas min fervoro,
«kiam mi virinon trovas».

Kaj mi ĉiam, sen alarmo
elforgesas, pro l'amvarmo
al virin' kiun mi trovas,
ke ja, malgraŭ ŝia ĉarmo,
«nomi ŝin demon' mi povas».

Mian koron ŝi venenas ;
sed pro la plezur' mi svenas
kiam, kvazaŭ de l' ĉielo
falintaĵo, al mi venas
«ŝi kun masko de anĝelo».

Amrigardojn, ampromesojn,
amdelogojn, amkaresojn,
ŝi rimedojn ĉiajn provas ;
ŝi, ĵurante amajn jesojn
«en inferon min enŝovas».

Sed... ne grave! ŝin mi trovu
kaj per amplezuroj povu
plenumigi ŝia celo ;
en inferon ŝi min ŝovu,
sed... «tra l' pordo de l' ĉielo!».

AL AMATINO DORMANTA

Dormu feliĉa! — dormu sen timo...
se lipoj fajraj
ne vin el dormo — vekos per kiso.

Dormu... kaj songu! — ŝongu ke amo
vin feliĉigas,
dum mi rigardos — vin kun ekstazo.

Ja, rigardante — vin tiel bela,
mi revos... revos
al songoj viaj — revojn identajn.

Dormu... mi dume — ĝuos la kredon
ke via songo
sentas l' influon — de miaj revoj.

* * *

Songû je tiam — kiam la nokto
 nin eksurprizis,
inter la ombroj — de densa bosko...

Songû je tiu — ĵuro solena
 kiun atestis,
de l' alta trono, — la luno hela...

Songû je l' ŝmaco — de amkaresoj
 kiun ni ĝuis,
post jeso via, — sur mola herbo...

Songû je l' sorĉa — rava muziko
 de anaj vortoj...
songû brakpremojn... — kaj songû kisojn...

* * *

De la senorda — blonda hararo
 la bukloj ŝajnas,
sur la kuscno, — ora kaskado...

brulas honteme — la vangoj ruĝaj,
 kvazaŭ du rozoj
elfloriĝintaj — sur neĝo pura...

la rondaj brakoj — marmore blankaj,
sur la littukoj
ŝajnas por l' amo — ĵus malfermataj...

de l' neĝa brusto — la takta ritmo
kaŝas... malkaŝas...
misterajn ĉarmojn — sub la kovrilo...

* * *

Jen... jen rideto — sur via buŝo...
jen liberiĝas
pluaj sopiroj — el via brusto.

Jen, malkvieto — jam vin ekscitas...
viaj okuloj
jam palpebrumas... — jam malfermiĝas...

* * *

Ĉu vi vekigis? — Kia ĉagreno!
pri amfeliĉo
elvaporigis — songoj kaj revoj!

* * *

Sed, ne! mi volas — pli longe revii
kaj iluzion
kaj amfeliĉon — pluan retenii.

Jen miaj brakoj! — jen miaj lipoj!
donu la viajn...
songojn kaj revojn — ni plidaŭrigos!

ENHAVO

	<u>Paĝoj</u>
Je la memoro de mia bopatro Artur Domènech (J. G. C.)	5
Amo (1914)	7
Al neamanta amatino (1915)	11
Sopiroj (1916)	14
El krepusko (1916)	17
Al Rozo (1921)	19
Konkurenco (1922)	22
La naskiĝo de Amo (1924)	23
Viaj okuloj (1925)	28
Ŝatata demono (1926)	31
Al amatino dormanta (1931)	33

P O E M O J

DE

ARTUR DOMÈNECH

PREZO: UNU PESETO

MENDEBLA:

JAUME GRAU CASAS

AIGÜESBONES (KATALUNUJO)

H I S P A N A R E S P U B L I K O